

MARTO 2003

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2003:2

88-a  
UNIVERSALA KONGRESO  
DE ESPERANTO  
Göteborg



*La Göta-placo kaj la Avenuo. Pozidono en la antaŭo. Foto: Kjell Holmner, Göteborg & Co*

## Internationell esperanto- kongress i Göteborg

Hittills mer än 1100 anmälda

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Marto 2003 • 91-a jarkolekto  
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:  
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: [nordenstorm@hem.utfors.se](mailto:nordenstorm@hem.utfors.se)

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2003: 200 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-  
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

E-post: [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)  
Nätsida: [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider  
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2003:  
Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-  
der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-  
rantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.  
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Agneta Emanuelsson

### Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgård 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: [nordenstorm@hem.utfors.se](mailto:nordenstorm@hem.utfors.se)

När kommer *La Espero* 2003?

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 3/4	16 maj	13 juni
Nr 5	7 augusti	8 september
Nr 6	17 oktober	17 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har bråd-  
skande information som måste komma ut senast ett visst  
datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

# Ann-Louise Åkerlund

*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Piteå antaŭ pli ol kvindek jaroj. En la sesa klaso ni komencis lerni la anglan, kaj en la naŭa mi ekkorespondis kun gejunuloj en la tuta mondo. Mia unua eksterlanda plumamikino, Abi el Australio, estas la sola, kun kiu mi ankoraŭ havas kontakton. Ni korespondas dum jam pli ol 37 jaroj kaj vizitis unu la alian kvar fojojn.

*Kie vi loĝas? Pri kio vi laboras?*

Nun mi loĝas en Helsingborg kaj laboras pri ekonomio kaj administrado.

*Ĉu vi havas familion?*

Mi havas edzon kaj (jam edziniĝintan) filinon.

*Kiel vi interesiĝis pri Esperanto?*

Ĉi tie en Helsingborg mi antaŭ proksimume sep jaroj la unuan fojon konatiĝis kun Esperanto. Mi tuj estis kaptita de la interesa lingvo kaj malkovris novan mondon malantaŭ ĝi. De tiam Esperanto okupas mian tutan liberan tempon (kaj eĉ pli).

*Ĉu vi havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Mi estas prezidanto de la loka klubo - Klubo Esperantista de Helsingborgo - kaj laŭ kapablo aktivas en Sunda Esperanto-Agado (SEA), kio estas kunlabora reto de kluboj kaj esperantistoj en Skanio kaj Selando. Mi foje gvidas kursojn en la klubo, kvankam mi ankoraŭ ne sufiĉe spertas pri instruado.



*Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?*

Pasintan septembron mi aliĝis al la interlingvistikaj studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando. Mi havas dudekon da studkamaradoj el diversaj landoj (eĉ Irano). Ni devas prilabori kvar temojn dum ĉiu semestro, skribi eseojn kaj trapasi buŝajn ekzamenojn. Estas tro multe por fari, kiam oni havas plentempan laboron kaj kromajn devojn, do, mi estos kontenta se mi sukcesos en almenaŭ du fakoj ĉiun semestron.

Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

## Vortoj de la redaktoro

Proksimiĝas la Universala Kongreso.

Samtempe Posten (La sveda poŝto) plialtigis la kostojn por dissendado de revuoj. Por *La Espero* kaj por Sveda Esperanto-Federacio tio estas preskaŭ ŝoko.

Pro tio ni ne kiel planite povos eldoni ses eldonojn de *La Espero* dum 2003. Estos nur kvin eldonoj, sed unu estos duobla. Do, ni klopodos doni al vi la saman nombron de paĝoj kiel planite.

Dum la Universala Kongreso ni renkontos multajn eksterlandajn esperantistojn. Pro tio estos bone se ni povos rakonti pri nia lando en Esperanto. Aparte bonvenaj estos artikoloj pri diversaj

fenomenoj en Svedio por numero 3/4, kiu aperos en junio. Se iuj el vi ŝatus skribi pri vidindaĵoj aŭ regionoj en Svedio, pri sveda historio kaj kulturo, mi ĝojus. Tiel ni povos ekzerci rakonti pri nia lando.

Mi ankaŭ bezonas artikoletojn por la rubriko "Lingvo". Kiu emus verki pri lingvaj fenomenoj? Samtempe, kiam mi invitas novajn verkemulojn, mi volas danki al tiuj, kiuj jam sendis materialon por *La Espero*.

Leif Nordenstorm

# Nun 4764 artikoloj en Esperanta Vikipedio: Bonvenon kunlabori!

Ekzistas Vikipedio en Esperanto, rete konstruata enciklopedio. La Esperanto-versio komenciĝis en novembro 2001 kaj nun enhavas 4765 artikolojn. Ni volas havi pli ol 100.000, do ni laboru! Ĉiuj - inkluzive de vi! - povas redakti ĉiun artikolon, korekti lingvajn erarojn, pligrandigi artikolon, skribeti, aŭ skribegi. Vidu la oftajn demandojn por lerni kiel redakti paĝon kaj aliaĵojn. Vizitu la paĝon pri lastaj ŝanĝoj por vidi kio estas nova, kaj ne hezitu kontribui libere, ĉar ĝi tio estas komunuma projekto! Rimarku ke tio ne estas finita verko kaj la Vikipedio senĉese pliboniĝadas.

Jen unua provo krei veran esperanto-enciklopedion dank' al la reto! Ni estas la 4a plej granda vikipedio post la angla (94000 artikoloj), germana (7300), kaj la pola (5600). Post Esperanto (4200) estas la franca (3200), la hispana (2500), nederlanda (2503) kaj la sveda (1116). Ankaŭ vidu: Internacia Vikipedio.

En Esperanta Vikipedio la ĉefaj rubrikoj estas:

## Filozofio, Matematiko, kaj Naturscienco

Astrosciencoj - Biologio - Filozofio - Fiziko - Kemio - Matematiko - Sciencoj - Tersiencoj

## Sociaj sciencoj

Arkeologio - Astrologio - Ekonomiko - Geografio - Historio - Homsciencoj - Lingvistiko - Pedagogio - Politiko - Psikologio

## Teknikartoj kaj Sciencoj

Agrikulturo - Arkitekturo - Edukado - Inĝenierarto - Juro - Komerco - Komputiko - Komunikaĵo - Publikaferoj - Sansciencoj - Scienco - Skribarto - Teknologio - Transporto

## Kulturo

Arto - Asocioj - Belarto - Bildliteraturo - Danco - Esperanto-kulturo - Hobioj - Kino - Kuirarto - Lingvoj - Literaturo - Ludoj - Mitologio - Muziko - Religio - Sporto - Teatro - Turismo

Sub ĉiu ĉefa rubriko estas multaj subrubrikoj.

"Vikipedio" devenas el la angla Wikipedia. Ankaŭ "Vikio" devenas el la angla Wiki. Wiki devenas el la Havaja vorto "wikiwiki" kiu signifas rapida. Vikio estas nova teknologio, do ĝi ne

jam estas en vortaroj.

Vikipedio uzas la x-sistemon por redakti anstataŭ simple pura Unikodo, ĉar oni volas ke tiuj, kies komputiloj ne bone unikodumas, povu ankaŭ legi kaj redakti paĝojn. Se oni povas tajpi unikode en via foliumilo, vi ja rajtas fari tion dum la redaktado. La Vikio ĝuste konvertos la literojn por ĉiu.

Oni ne intermiksi vortaron kaj enciklopedion. Ili estas tute malsamaj aferoj. Vortaro temas pri lingvo, kaj enciklopedio temas pri scio. Do, vikipedio do ne estas interreta vortaro.

Se vi interesiĝas pri vikipedio, la plej bona maniero estas mem ekzameni kio ĝi estas en interreto je [www.eo.wikipedia.org](http://www.eo.wikipedia.org)

## Specimeno pri Svedio

Por ke la legantoj de La Espero vidu specimenan tekston el Vikipedio, ni jen publikigas ĝian tekston pri Svedio. Observu ke la substrekitaj vortoj, estas ligoj. Se vi premas tiujn vortojn, la komputilo montras al vi novan retpaĝon kun informoj pri tiu loko. Multaj el la paĝoj, ekzemple pri svedaj gubernioj (*län*) estas malplenaj. Tio signifas ke neniu verkis ion sur ili. Eble vi havas materialon, kiun vi povas sendi al Vikipedio por ke estu informoj pri ĉiuj gubernioj ĝis la Unversala kongreso. Do, ek al Vikipedio!

## Svedio

El Vikipedio, la libera enciklopedio.  
Geografio > Eŭropo > Nordio > Skandinavio > Svedio

*Sverige* [sverjel]

Lando en Norda Eropo, en la orienta parto de la Skandinava duoninsulo.

\* Landkodo: **SE**.  
\* E-nomo: **[a] Svedujo, Svedlando; [o] Sveda Reĝlando**.  
\* Nacia nomo: **Konungariket Sverige**.

\* Areo: **449.964 kv.km**.  
\* Politika sistemo: **konstitucia monarkio**.

\* **Ŝtatestro**: reĝo *Carl XVI Gustav*.  
\* Leĝdona organo: **Parlamento (Svede: Riksdagen)**.

\* **Ĉefurbo**: *Stokholmo* (754.948

loĝantoj en 2002).

\* **Urboj**: *Göteborg* (471.267 en 2002), *Malmö* (254.904 loĝantoj en 2002).

\* Adm. divido: **24 regionoj (län)**.

\* Loĝantaro: **8.909.128 (2002), inter ili 92,8% svedoj, 3,6% finnoj**.

\* **Ŝtatlingvo**: *Sveda*

\* **Oficiale rekonataj lingvoj de malplimultoj**: *Samea, Finna, Tornival-Finna, Cigana, Jida*.

\* **Kredantoj**: *luteranoj*.

\* GNP: **totala - 232 mlrd \$; poka-pa - 23.750 \$**.

\* **Eksporto**: *aŭtomobiloj, ŝtalo, fero, papero*.

\* Monunuo: **sveda krono SEK (= 100 oeroj)**.

\* **Organizoj**: *EU, UNO (1946)*

\* **Nacia himno**: *Du gamla, du fria* (Vi alta, libera)

Regionoj:

- \* *Blekinge*
- \* *Dalarna*
- \* *Gotland*
- \* *Gävleborg*
- \* *Halland*
- \* *Jämtland*
- \* *Jönköping-regiono*
- \* *Kalmar-regiono*
- \* *Kronoberg-regiono*
- \* *Norrboten*
- \* *Skanio*
- \* *Stockholm-regiono*
- \* *Södermanland*
- \* *Uppsala-regiono*
- \* *Värmland*
- \* *Västerbotten*
- \* *Västernorrland*
- \* *Västmanland*
- \* *Västra Götaland*
- \* *Örebro-regiono*
- \* *Östergötland*


Se vi ekzemple malkontentas ke la svedaj *län* havas en vikipedio nomiĝas "regionoj" kaj ne kiel kutime "gubernioj", vi povas mem aldoni vian opinion.

**Leif Nordenstorm**

*Laŭ informoj en Esperanta Vikipedio*

# Otto William Zeidlitz - präst, folkbildare och esperantopionjär

*En av de första esperantisterna i Sverige var O.W. Zeidlitz. En av hans översättningar finns med i antologin Fundamenta Krestomatio. Det kanske är han som skymtar fram som den esperantotalande prästen i Mikael Niemis roman Populärmusik från Vittula. Låt oss presentera honom med en artikel, egentligen skriven för en bok som kommer ut till Luleå stifts hundraårsjubileum 2004.*



Otto William Zeidlitz, under sin ålders höst

Otto William Zeidlitz var en av de mest mångsidiga präster vi har haft i Luleå stift. I minnesorden över honom från 1947 års prästmöte beskriver minnesteknaren J.A. Lindahl honom som "författare, pedagog och studieledare, bankman, ekonom och jordbrukare, patriot och människovän, en originell, särpräglad och stark personlighet med fel och väsentliga förtjänster". Till allt detta vill jag lägga till "esperantopionjär och internationalist".

Otto Zeidlitz var yngst i en familj med åtta barn. Han föddes 8 december 1860 i Lits församling i Jämtland. Hemmet var fattigt. Han var tvungen att färdas nästan två mil till skolan. Efter skoltiden fortsatte han att bedriva självstudier. Han var sedan barndomen kristen och hans tro fördjupades än mer när modern dog. En tid arbetade han på ett sågverk i Sundsvallstrakten. Han sparade av sin lön för att kunna studera vid Fjellstedtska skolan i Uppsala, där han kom in hösten 1880, samma år

som skolans nuvarande lokaler invigdes. På Fjellstedtska skolan fanns internat med realskola och helklassiskt gymnasium. Skolan syftade till att vara en förberedande privatskola för blivande präster. Under ferierna fortsatte Otto Zeidlitz att arbeta vid sågverket för att få ihop pengar till fortsatt skolgång. Han fortsatte sina studier vid Gävle läroverk och avlade examen där i maj 1885. Under ett par år biträdde han så lappmissionären August Lundberg vid den kombinerade lappskolan och missionsstationen i Lannavaara, där han även lärde sig lapska och finska. I bevarade brev kan vi läsa om hur Zeidlitz gläds över sin uppgift: "Nu kan vi glädja oss åt icke så få som anammat frälsningens ord... (—) det är Guds ord, som är det skarpa tveeggade svärdet, det är evangelium som föder söner och döttrar, det är både Lundberg och jag ense om."

Zeidlitz befriades från kravet om akademisk examen och prästvigdes i november 1888 i Uppsala domkyrka av biskop Martin Johansson. Efter prästvigningen tjänstgjorde Zeidlitz som pastorsadjunkt och fängelsepredikant i Pajala. 1892 kom han som kapellpredikant till Muonionalusta och 1895 till Korpilombolo.

1887 publicerade ögonläkaren Lazar Ludwik Zamenhof i Warszawa en bok om det internationella språket esperanto, som han hade konstruerat som ett "allas andra språk", betydligt lättare än de nationella språken och tänkt som ett förbindelsemedel mellan världens folk och som ett sätt att skapa fred i världen. Redan 1890-1891 började ett antal Uppsala-studenter att lära sig esperanto och grundade den andra esperantoklubben i världen. (Nürnberg var först.) Till klubben hörde bl.a. Valdemar Langlet, som under andra världskriget påbörjade den räddningsaktion för ungerska judar, som sedan fortsattes av Raoul Wallenberg. Till esperantoklubben hörde också Otto Zeidlitz. Under sin tjänstgöring i Muonionalusta och Korpilombolo fortsatte Otto Zeidlitz att verka för esperanto. 1895 utkom Emilie Flygare-Carléns *Literatören och hans trolöfvade* i Zeidlitz översättning till esperanto och 1898 utkom Zeidlitz eget verk *Du mirrakontoj* (Två berättelser) i Nürnberg.

En av dessa berättelser förtjänar

uppmärksamhet. Den är skrivet på ett språk som bara var sju år gammalt. Ändå är berättelsen levande och uttrycker den erfarenhet och vilja som skulle präglade Otto Zeidlitz hela livsverk. Den handlar om hur en liten pojke, Johan Olof, som växer upp i fattigdom, vill bli författare, och om hur den gamle läraren i byn först tycker att det är en orealistisk tanke, men sedan uppmuntrar honom. Johan Olofs mor dör emellertid; pojken måste börja arbeta och det enda han någonsin kommer att skriva är texten på hennes gravsten: *Al patrino, de sia knabo. Atendu min en ĉielo, mi venos, kiam Dio vokos.* (Till mor, från hennes gosse. Vänta på mig i himlen. Jag kommer, när Gud kallar.) Gudsfröströstan var viktig för Otto Zeidlitz. Viktigt var det också att ta vara på barn och ungdomar på landsbygden, som annars aldrig skulle få någon utbildning. Otto Zeidlitz hade själv fått kämpa för sin utbildning, och nu ville ha hjälpa andra. Viktigt var det också för honom att skriva på esperanto, språket som skulle skapa fred och förståelse bland folken. I världens då enda esperantotidning *Lingvo Internacia*, som 1895-1900 utgavs i Uppsala och som tidvis trycktes i Luleå dyker Zeidlitz namn vid ett flertal tillfällen upp som översättare och som författare till poesi på esperanto. Det är för övrigt möjligt att den esperantotalande prästen i Mikael Niemis roman "Populärmusik från Vittula" snarare har Otto Zeidlitz som förebild än den präst som nämns i boken.

Sedan Zeidlitz 1899 tillträtt som kyrkoherde i Pajala kom han att stanna kvar på sin tjänst i över fyrtio år, till pensioneringen 1941. Under denna tid utförde han en oerhörd livsgärning i Pajala. Under dessa fyrtio år lärde han känna folket och dess kynne, språket och bygden. Han gjorde en oerhörd betydelsefull insats på skilda områden.

Han både startade och drev en privatskola, där både hans egna barn och andra studieintresserade fick undervisning. Otto Zeidlitz verkade också för att det svenska språket skulle få en allt starkare ställning i det då helt finskspråkiga Tornedalen. Folkskolan organiserades på den tiden av kyrkoförsamlingarna. Domkapiteln utövade i sin tur tillsyn över folkskolorna. Zeidlitz hade ett fast grepp om skolan i Pajala och brydde

*La sama artikolo publikigis en Esperanto en Festlibro Esperante kaj Ekmene por Pastoro Adolf Burkhardt, aperonta en 2004.*

sig inte alltid om vad vare sig förordningar, domkapitel eller biskopen ansåg. Han påstås ha rätt yngre präster att "expediera domkapitlets skrivelser genom kakelugnen, för så har jag gjort".

Otto Zeidlitz nöjde sig inte med att organisera skolor för andra. Han hade ett stort bibliotek och läste gärna. Han påstods ha studerat fjorton olika språk, både klassiska och moderna. Under början av 1900-talet omtalades de kringvandrande ryska sågfilarna, som misstänktes för att spionera för Rysslands räknig. En av dessa sågfilare fick till sin förskräckelse se kyrkoherden läsa den tidning som han själv hade lagt ifrån sig under ett besök i prästgården.

Liksom sin företrädare som kyrkoherde i Pajala, Lars Levi Læstadius var Otto Zeidlitz också intresserad av botanik. Under sina resor och vandringar passade han på att komplettera sitt herbarium.

Otto Zeidlitz skrev aldrig några större bokverk, men han var författare i det lilla. Under signaturen W. Ozetha skrev han inlägg i ortspresen. Han var också medarbetare i Tornedalens hembygdsbok och i ett antal tidskrifter. Han skrev också vers. Han översatte både psalmer och skönlitteratur till esperanto.

Otto Zeidlitz var även aktiv jordbrukare och nyodlare. Han bröt själv tegar och bärgade skördar på sina odlingar. Redan vid tretiden på sommarmorgnarna kunde han vara ute med lien. Han tvekade inte heller för att på äldre dagar köpa ett förfallet hemman, där han bedrev nyodlingar.

Pajalas kyrkoherde hann också vara engagerad i Pajala sparbank, där han under tjugo år var kamrer. Han hann också bilda och vara med i nykterhets, studie- och sångföreningar. Otto Zeidlitz lär ha hävdad att Gud ju bestämt att människan skall arbeta sex dagar, och endast den sjunde hålla helg och gudstjänst. Om man tror att detta innebar att han misskötte de prästerliga sysslorna på vardagarna så tror man fel. Trots sina många olika intressen hann han också med att vara församlingspräst. Han var ofta ute på resor och vandringar för att predika i pörten, stugor och bönhus. Han tyckte att det var viktigt att övernatta hos folket i byarna, och att på så sätt ge sig tid att lära känna dem ordentligt. Moderna tidens "bilpräster" hade han inte mycket till övers för. Otto Zeidlitz menade att byabönerna var mycket viktiga för enskildas och församlingens andliga liv. Han var en stor fosterlandsvän och lär ha avslutat högmässorna med "Gud bevara konungen och fäderneslandet!"

Vid sidan av allt detta var Otto Zeidlitz också äkta man och far. 1890 gifte han sig med Frida Albertina

## Ĉe l' tomo de E. Flygare-Carlén

Popolo sveda ĉe la tomo ploras  
Maldolĉe multe, kiam ĝi memoras  
Filinon noblan, kiu iris for.  
Palaco reĝa ĝis malgranda korto -  
Al ĉiuj donis pezan donon morto,  
Grandegan mankon, senton de  
dolor'.

Foriris ŝi, la glora verkistino,  
Plej diligenta de l' naci' filino;  
Formetis plumon por ripozo ŝi.  
Sed vivos en multegaj verkoj ĉiam  
Spirito ŝia, iros for neniam  
Trezoro, kiun donis ŝi al ni.

Post longa tago, plena je laboro,  
Vi tial dormu kara, varma koro!  
Ripozu dolĉe nun; ni benas Vin!  
Sed disvastiĝu trans la land' kaj maro  
La verkoj Viaj tuta al homaro  
Kaj konatiĝu ĝis de l' mondo fin'.

Otto William Zeidlitz

## Ĉe la nova jaro

Finigis jam por ni malnova jaro  
Eterne pasis ĝiaj tagoj for.  
Tre bona estis ĝi por la homaro,  
Kaj ni ĝin danku el la tuta kor'!

Sonoras adiaŭaj sonoriloj  
Solene super land' kaj super mar'  
Kaj ekesperas de l' homar' la filoj,  
Ĉar venos baldaŭ la estonta jar'.

Malfermas iu pordon. Jen infano  
Aperas bela en la ĉambr' al ni,  
Portante libron en malgranda mano,  
La bona nova jaro estas ĝi.

Se kio estas de la libr' enhavo?  
Feliĉo aŭ malbono? Diru ĝin!  
Benita paco aŭ kruela glavo?  
Ĉu venos ĝojo aŭ malĝojo nin?

Falck från Hietaniemi. De fick tolv barn, bland dem fyrtingar som avled kort efter födelsen. Vi kan räkna med att hustrun Frida Albertina, liksom som många kvinnor på den tiden, genom att ta stort ansvar för hemmet, gjorde det möjligt för sin man att vara en "originell, särpräglad och stark personlighet".

Otto Zeidlitz var arbetsam och idog till sin död. Under de senaste åren var han nästan helt döv, en skada som han fått sedan han blivit påkörd av en bil. Trots detta sågade han ved själv, över åttio år gammal.

Han avled 3 augusti 1943.

Leif Nordenstorm

Ne scias ni kaŝitan estontecon,  
Ĉar restas ĉio en la man' de Di'.  
Sed kion ajn sendados Li, bonecon  
Li donos, kaj kontentaj estu ni.

Otto Zeidlitz

*El Lingvo Internacia, December (TIEL!)  
1895, Prova numero.*

## Birdoj migrantaj

Varmege ĉe Nilo bruladas la sun',  
La ombro palmara foriĝas jam nun,  
La koron ekkaptas enu' je l' patrujo.  
Birdar' kolektiĝas. Al Nord'!

Al Svedujo!

Profunde sub ni, kvazaŭ en la  
tombar',  
Sur tero verdanta, bluanta sur mar'  
Noviĝas malĝojo, ventegas severe,  
Sed ni kun la nuboj vojaĝas libere.

Jen alte en montoj, sur verda placet'  
Ripozas birdaro, pretiĝas nestet'.  
Ni en Akvilono la ovojn metadas,  
Sub suno meznokta birdidojn  
kovadas.

Pafisto forestas en paca la val'  
Nimfet' orfulgila rapidas al bal'.  
Arbara fraŭlingo vespere iradas,  
Hometoj en montoj la oron forĝadas.

Sed neĝa vintrido revenis al ni  
Sur montojn, skuante flugilojn  
kun kri'.  
Leporo blankiĝas, sorpbero ruĝiĝas.  
Al Sudo! Al Sudo! Birdar' kolektiĝas.

Al ondoj varmetaj, al verda herbar'  
Enu' nin retiras, al ombra palmar'.  
Ni tie ripozas post vojo aera,  
Ni tie enuas je norda la tero.

Esaias Tegnér.

Esperantigis: Otto Zeidlitz

*El Lingvo Internacia, December (TIEL!)  
1895, Prova numero.*

### Källor:

Brännström, Olaus. Lannavaara-missionen och læstadianismen. Stockholm: Almqvist & Wiksell International, 1990.  
Flygare-Carlén, Emilie: La literaturisto kaj lia flancino : rakonto / de Emilie Flygare-Carlén. Trad. Otto W. Zeidlitz. - Uppsala: Esperantoförenings Förlag, [1895].  
Lindahl, J.A.. Minnestal över avlidna ämbetsbröder, Otto William Zeidlitz. I Handlingar rörande prästmötet i Luleå 5-7 aug. 1947, s. 127-132 ff.  
Söderberg, Karl. La Esperanto-Movado en Uppsala. Uppsala: Esperanto-Societo de Uppsala, 1981.  
Intervju med barnbarnet Ingmar Zeidlitz i Kiruna, i januari 2002.

## Kiel traduki insultojn?

En la laboro por nova esperanto-sveda vortaro, ni de tempo al tempo renkontas vortojn en esperanto, kiuj bezonas bonan tradukon en la svedan.

Nun mi tamen volas inversi la temon kaj peti vian helpon. Ne nur por helpi nin, sed samtempe por ĝojigi vin kaj aliajn.

Troviĝas multaj epitetoj por karakterizi homojn en la sveda lingvo. Nun estas via tasko proponi adekvatajn epitetojn en Esperanto. Mi ne povas promesi valorajn premiojn, sed mi kredas ke tia "konkurso" povos vekii vian fantazion kaj intereson.

Do sendu viajn proponojn al mi perpoŝte au per interreto. Poste mi prezentos la alvenintajn proponojn

en nia gazeto.

Jen la svedaj epitetoj:

knäppskalle	satkårring
fifflare	markatta
fixare	fjolla
fåntratt	skata
fåhund	rivjärn
födgeni	nattfjäril
myglare	slampa
klippare	förförerska
krake	nippertippa
kruka	drummel

Sendu viajn proponojn al: Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Haninge, roland@esperanto.se

**Roland Lindblom**

## Dispensario en Togolando

**Kossi Logossou** loĝas en Anyronkope, vilaĝo trans lago en la sudo de Togolando. Ĝi estas la naskiĝloko de jam pluraj aktivaj kaj talentaj togolandaj esperantistoj.

Kossi loĝas kaj laboras tie denaske. Li estas terkulturisto kaj sanhelpisto en la dispensario de Anyronkope. Tie li flegas vunditojn, malsanulojn, kiel unu el la helpantoj de katolika misiistinaro.

Li jam de pluraj jaroj lernis kaj uzas Esperanton bone, fidele, kaj li fondis klubon "Espero de Anyronkope", unu el la Togolandaj kluboj kiuj kolektiĝis en "Unuiĝo Togolanda de Esperanto".

Kossi verkis mallongajn rakontojn pri lia sorto, la vivo en Anyronkope, pri feliĉo kaj pri la tuttaga vivo. Tiuj rakontetoj estas simplaj sed valoraj kiel la folioj en arbo.

Hans Bakker, la organizanto de la Afrika Agado, donis la nomon la "Folietoj" al tiuj rakontoj, ĉar ili estas kvaŝu tiuj sennombraj folioj, kiuj estas nutrataj de la radikoj kaj la trunko, sed ankaŭ siavice estas necesaj por la vivo de la tuta arbo. El la Foliaro ni elektis por vi la folion:

### La vilaĝa dispensario

Mi ŝatas tiun dispensarion. Ĝi estas situanta apud la ĉefa strato de mia vilaĝo. Ĉiutage ni akceptas multe da malsanuloj, precipe de najbaraj vilaĝoj. Oni laboras kvin tagojn semajne. La dimanĉo kaj la lundo estas por ni tagoj por ripozo. Ni malfermas la dispensarion de la sepa horo matene ĝis la unua posttagmeze. La malsanuloj estas pli ol ducent ĉiutage.

La oftaj malsanoj de nia ĉirkaŭaĝo estas la morbilo, la febro kaj la tuso ĉe la beboj kaj infanoj. La malario estas precipe por plenkreskuloj. Mi distribuas medikamentojn al malsanuloj en mia dispensario. Tiu metio estas tre bona por mi. Tuj kiam malsanulo pagis, mi prenas ilian notlibreton kaj donas liajn medikamentojn. Jen estas mia metio ĉiutage. Tri kolegoj ankaŭ helpas min.

Du personoj en la registrejo enskribas la nomojn de ĉiuj malsanuloj kiujn ni akceptis ĉiutage. Ni havas du francajn religiulojn kiuj esploras la malsanulojn. Ili estas flegistinoj.

Mi ĝojas labori por mia vilaĝo, mia patrujo kaj por ia tuta mondo por savi homojn kiuj multe suferas pro diversaj malsanoj, ĉar tio devas esti la ideo de ĉiuj esperantistoj tra la nuna mondo.

**Kossi Logossou**

## DENOVE AKTUALA

# Kredo, floroj, dinamito



*Kredo, floroj, dinamito ne estas tute nova libro, sed tamen daŭre aktuala. Ĝi temas pri tri konataj svedoj: Sankta Birgitta, Carl von Linné kaj Alfred Nobel. Ĝi kostas nur 38 kronojn plus sendokostoj. Bona ideo estas mendi kelkajn ekzemplerojn tiel ke oni povas donaci al eksterlandaj geamikoj. (Vidu la anoncon sur p.*

*11.) Jen vi povas legi specimemon pri Sankta Birgitta, ĉi-jare aktuala pro jubileo.*

En Romo la akcepto estis kontentiga. La frato de la papo disponigis al Birgitta sian kardinalan palacon ne loĝatan dum lia restado en Avignon. Sed la papo mem ne venis. Por la jubilea jaro li sendis legaton. Tio klarigis, ke li eĉ ne intencis veni. Nur malrapide Birgitta povis plenumi sian ĉefan taskon. Fine ŝi skribis leteron al la nekronita germana imperiestro Kar-

lo la IV-a en Prago. Kiel sendinton de la letero ŝi indikis Kriston. "De imperiestro Kristo al imperiestro de Germanujo". Tio estis admono kontakti kun la skribinta persono por ekkoni "la kongregacian regularon diktitan de Jesuo". Sed la letero restis sen respondo.

La tagoj fariĝis longaj sed ne senuitaj. La eta, maljuna virino fariĝis atentata kaj konata en Romo. Ŝi sentis hejmecon en la romaj preĝejoj kaj ŝi famiĝis kiel piulino.

Antaŭsentemuloj vidis jam aŭreolon ĉirkaŭ ŝia kapo. Ŝi havigis al si amikojn kaj defendantojn kaj tial ŝi facile trovis novan restadejon, kiam en 1354 la kardinalo finfine ŝin admonis al transloĝo. Birgitta restis en Italujo, preĝis, ekhavis revelaciojn kaj atendis. Ŝiaj infanoj Birger kaj Karin ŝin vizitis, sed ŝi rifuzis revojaĝi kun ili al Svedujo. Preskaŭ dudek jarojn ŝi atendis la elekton de papo, kiu konsentu reveni al Romo. Kaj ŝi estis tro maljuna por fariĝi abatino, kiam la papo fine revenis al Romo en 1367. Jen do la premiso por la sankcio de ŝia kongregacia regularo. Sed por eviti plenan rifuzon estis konsilinde ne rapidigi la aferon. La 5-an de aŭgusto 1370 venis la papa decido. La regularo estis aprobita, sed nur kiel aldono al la aŭgustenana. Ŝi nun havis la permeson fondi monaĥinejon en Vadstena; sed nur unu, ne pli.

## KKE helpas Afrikan movadon

En aŭgusto 2001 Kultura Kooperativo de Esperantistoj starigis kampanjon nomatan 'Esperanto en la bibliotekoj', kiu celas provizi per E-aj libroj la brazilajn aŭ alilandajn bibliotekojn. Ĝis nun estis senditaj pakajoj kun E-aj libroj al 14 brazilaj bibliotekoj kaj unu pakajo entenanta 40 E-aj libroj al la naskiĝanta E-movado de Paragvajo. Nun oni ĵus ekspedis pakajon entenantan dek E-ajn librojn (bildvortaro, legolibroj, primovadaj kaj literaturaj verkoj) al Konga Esperanto-Rondo, en Kinŝaso en Demokratia Respubliko Kongo.

## 'Kristana Espero' nun aperas dufoje jare

La bulteno 'Kristana Espero' aperas dufoje jare, do en januaro kaj julio. 'Kristana Espero' estas kompilaĵo de mallongaj tekstoj el la Biblio por ĉiu tago de la jaro. La abono estas senpaga. Interesuloj petu provnumeron de la redaktoro ĉe: [espero@milwpc.com](mailto:espero@milwpc.com) Simila enhavo aperas ankaŭ elektronike sur la retpaĝo 365 Tagoj el la Biblio ĉe: <http://www.geocities.com/jeraldveit/esperanto.html>

## Staĝoj en Francio

La kultura domo de Esperanto (Kastelo Grezijono en Boje apud 'Angers') malfermos siajn pordojn tiu somero kaj proponos diversgradajn staĝojn (28/06 ĝis 30/08). Informoj ĉe: - tel/fakso: +33 (0)2 41 89 10 34 - retmesaĝo: [grezijono.kastelo@free.fr](mailto:grezijono.kastelo@free.fr) - ttt: <http://grezijono.kastelo.free.fr>

## Pedagogia kaj turisma kursoj

Preskaŭ 100 gestudentoj el Eŭropo, Afriko kaj Azio partoprenis la Internacian Pedagogian Kurson, kiu okazis en ISTK-AIS klerigejo en Bydgoszcz, Pollando (31.01-9.02.2003). Okazis interalie kursoj de Esperanto kaj hispana lingvoj gvidataj de Augusto Casquero de la Cruz, Cseh-seminarioj sub gvido de Ewa Bondar, kurso pri

planado de karieroj - de Romeo Grzebowski kaj pluraj kursoj pri didaktiko, pedagogio, psikologio kaj sociologio, kiujn gvidis profesoroj de Bydgoszcz-a Akademio kaj de Vojevodio Centro de Edukado de Instruistoj.

Nun la gestudentoj prepariĝas al internacia kurso por E-vojaĝ-gvidantoj kaj 23 Pola AIS - sesio en Bydgoszcz dum 26 aprilo - 4 majo 2003 (kotizo 100 USD + 50 USD aŭ eŭroj por loĝado). Povas ĉeesti ĉiu, kiu interesiĝas pri turismo kaj kulturo. Samtempe, esperantistoj kiuj ŝatas instrui Esperanton, ankaŭ turismikon kaj kulturon povos prepari al tiuj kurso kaj sesio ankaŭ neesperantistojn, kiuj interesiĝas pri turismo, kulturo kaj lingvoj. La interesiĝanto pagos por la E-instruado 200 USD aŭ 200 eŭroj, el kiuj duono 100 USD restos por la laboro de E-instruisto kaj aliaj 100 USD por partopreni kurson kaj sesion en Bydgoszcz dum 26 aprilo - 4 majo 2003. Tiuj, kiuj sukcese ĉeestos la kurson kaj studadsesion en Bydgoszcz, povos daŭrigi la studadon ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj por bakalauriĝi aŭ poste magistriĝi ĉe AIS. Tiamaniere eblos kontribui al plia internaciigo de Esperanto-instruado en la mondo.

## Simbolo bezonata

La japana E-movado fariĝos 100-jara en 2006, kaj oni planas jubileajn agadojn; por tio oni varbas simblon grafikajn tramonde. Ĝi estu nigra-blanka en grandeco de 10 cm x 10 cm, uzebla en malpligrandigita formato. Limdato: 12a de apr. 2003. Publikigo: en majo. Premio: 10000 JPY (ĉ. 80 EUR) Sendu al: (s-ro) Huzimaki Ken'iti, Oka Issiki 501, Numazusi, 410-0012 Japanio E-poŝto: [esperanto@thn.ne.jp](mailto:esperanto@thn.ne.jp) Organizas: Japana Esperanto-Instituto

## Rezulto de Liro- 2002

45 konkursaĵojn de 22 aŭtoroj el 12 landoj ricevis la organizantoj de la tradicia belarta konkurso Liro-2002. La kvinpersona juĝkomisiono (Alekses Birjulin, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korjenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov) anoncis laŭreatojn: Originala prozo: Paul Gubbins. Originala poezio: Nicolino Rossi. Traduka poezio el la rusa: Michel duc Goninaz.

Traduka prozo: Sten Johansson. La konkurso organizis La Ondo de Esperanto.

## Kurso pri la historio de Esperanto

Prepare al la 90a Universala Kongreso de Esperanto (Vilno, 2005) Litova E-Asocio kaj la redakcio de 'La Ondo de Esperanto' okazigos serion de Klerigaj Semajnfinoj. Kiel la unua temo estas elektita la historio de Esperanto. Aleksander Korjenkov (Kaliningrad, Ruslando) faros 10 temajn prelegojn, kiuj estos prezentitaj en du semajnfinoj. La unua Kleriga Semajnfino okazos 22-23 feb 2003; la dua estas planata por 29-30 marto 2003. La kurso okazos en la Esperanto-domo en Kau'no. Pliajn informojn petu ĉe LitEA <[litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt)>. Bonvenon!



## Ĝis la 20a de januaro

aliĝis al la Universala Kongreso de Esperanto ĉirkaŭ 1100 personoj el 50 landoj, ĉefe el Svedio, Francio, Japanio, Germanio, Nederlando, Finnlando kaj Italio, sed ankaŭ el Uzbekio, Reunio kaj Gvajano.

Ĉu ankaŭ vi?

## DONACOJ

RONDO  
LANGLET

Ĉiumonataj donacoj: Ingrid Göransson, Kalmar 200 kr; Leif Nordenstorm, Boden, 150 kr; Lenart Sundman, Västerås, 100 kr; Göran Lundgren, Stockholm, 100 kr; Tore Johansson, Kalmar, 100 kr; Signhild Johansson, Kalmar, 100 kr; Börje Andersson, Skövde, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten Anders Hanerz, Skotgås, 84 kr; Wim Posthuma, Västerås, 50 kr.

Se vi volas aliĝi al Rondo Langlet, kontaktu la SEF-kasiston Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205, e-poŝto: freds@artech.se

## FONDUSO 70+

Åke Waller, Umeå, 100 kr; Bengt Lindqvist, Umeå 200 kr; Göta Nordlander, Kramfors, 50 kr; Eric Castell, Ryd, 200 kr.

SEF kore dankas por la donacoj. Novaj estas bonvenaj al pĝ. 2012-3.

Hälsning från  
katolske biskopen

Den katolske biskopen i Stockholms katolska stift, Anders Arborelius, vilket omfattar hela Sverige skriver: "Jag ber om Guds välsignelse för er alla som skall delta och att ert engagemang för att esperanto skall föra människor närmare varandra."

Biskopen har också gett sitt tillstånd till en ekumenisk (protestantisk-katolsk) gudstjänst i samband med den Universella Esperanto-kongressen i Göteborg.

Ni bezonas  
volontulojn

La evento de la jaro - la 88-a UK - alproksimiĝas. Por la sukceso de la kongreso laboro de multaj homoj estas bezonata. Ni esperas, ke vi estas inter tiuj, kiuj pretas kontribui per volontula laboro. Ĉu eble vi pretus gvidi ekskursojn?

Ne timu - en ĉiu aŭtobuso kuniros profesia gvidanto kaj ni volas kune kun vi, kaj kun asisto de gvidanto, prepari la materialon en bona tempo. Jam kelkaj dokumentoj estas pretaj, aliaj survoje, tradukitaj en Esperanton de grupo en Upplands Väsby. Okazos kvin diversaj tuttagaj ekskursoj kaj ses duontagaj (inter du- kaj ses-horaj).

Ekskursoj okazos ĉiujn tagojn, sabato-vendrede.

Se vi pretas kunlabori en tiu kampo, bv. respondi baldaŭ. Ni bezonas plurajn gvidantojn por la sama ekskurso, depende de la intereso de la ekskursoj. Eble pluraj busoj iros samtage al la sama celo. Krome, ni ŝatus rezervajn gvidantojn por ĉiu ekskurso, se bezonate.

Ni planas diskuti la materialon kun interesitoj dum marto-aprilo. Bv. respondi rete: [anidag@telia.com](mailto:anidag@telia.com); telefono: 031-65 40 02; fakse 031-41 02 56; letere: Brita Rehm, Skäpplandsgatan 17, 414 78 GÖTEBORG.

Je pozitiva respondo, ni sendos al vi la priskribojn de la ekskursoj laŭ dua bulteno.

Kompreneble vi povas anonci, se ne ekskursoj, sed alia(j) kampo(j) interesas vin. Ni donos tiajn informojn al la koncerna laborgrupo.

**Brita Rehm & Anita Dagmarsdotter**

Skövde elektis  
novan klubestron

Dum jarkunveno en la Esperanto-klubo en Skövde, Karl-Gustaf Gustafsson elektigis nova prezidanto post Torsten Hammargren, kiu rezignis pri reelektio.

La klubo havas nun 33 membrojn. La jarraporto rakontis pri multaj diversflankaj renkontiĝoj dum la jaro, interalie jubilea festo pro la 70-jara ekzisto de la klubo.

En literatur- kan lingvokurso ok membroj studis multajn librojn kaj tradukojn de Esperanto-verkistoj. Kun la nederlanda klubo en Den Helder la klubo havas bonajn rilatojn.

La propra eta klubprezejo Al-fabet-o, prizorigata de Carl-Erik Ohlsson kaj Solveig Bertilsson, presis librojn de Sten Johansson, Gunnar Gällmo kaj Bertil Nilsson. Krome la prezejo nun komencis presi La Esperon.

Denove pri  
Zamenhof-tago en  
Stokholmo

En La Espero 2003:1 estis nekorektaj informoj pri la Zamenhof-tago (la 15-an de decembro) en EsperantoCentro en Stokholmo. Gastiganto estis Soile Lingman, prezidanto de la Stokholma klubo. Agneta Emanuelsson prezentis "Valdemar Langlet - en glömd hjälte?" (propra eldonejo). Bertil Nilsson prezentis "Introduktion till esperanto, Gunnar Gällmo prezentis "Dharmopadon" kaj "Kelkajn faktojn pri la Budhismo (Eldona Societo Esperanto).

Cetere oni prezentis la librojn en la libroservo de diversaj eldonejoj.

Estis agrabla etoso. Ni esperas ke tio ĉi estos tradicio.

**Agneta Emanuelsson**

La redaktoro bedaŭras la erarojn en la antaŭa versio de la notico, kiuj verŝajne devenis de erara intermikso de tekstoj de du malsamaj noticoj.

## Stig Kinnander

Vår mycket uppskattade medlem av den svenska sektionen av det Kristna Esperantoförbundet, Stig Kinnander, avled den 20 januari efter en längre tids sjukdom i cancer. Han föddes i Stockholm den 15 juli 1915 men flyttade med föräldrarna tidigt till Tibro. Sedan han genomgått Pålman's handelsinstitut, var han handelsbiträde. Sedan 1942 var han föreståndare för ICA-butiken i Tibro.

I missionsförsamlingen har han varit medlem i juniorförening, SMU och sedan 1962 var han medlem i missionsförsamlingen. Inom esperantorörelsen var han medlem i Kristliga Esperantoförbundet sedan 1961. Som styrelsemedlem deltog han under åren 1983 - 2000. Stig ansvarade för 27 resor till Polen med medicin och matvaror. Till Estland körde han två gånger. I mån av kraft deltog han i alla esperantokongresser. Han samlade in barn-teckningar från hela världen och ordnade utställningar av dessa.

Begravningen ägde rum i Tibro missionskyrka den 30 januari. Officiant var pastor Bengt Kindbom. Närmast sörjande är dottern Ulla Fritzson med make, barn och barnbarn, Tibro missionsförsamling och Kristna Esperantoförbundet. Till hans minne hölls en mässa i Kroskienko, Polen.

**Arne Lundkvist**

Stig Kinnander, Tibro membro en Skövde Esperantoklubb, mortins post longa malsano. Stig, kiu naskiĝis en 1915, dum pluraj jardekoj kunigis sian intereson por Esperanto kun granda helpagado por malriĉaj homoj en Polujo kaj la baltaj ŝtatoj. Multnombraj estis la aŭtobusaj karavanoj kun vestaĵoj kaj manĝaĵoj, kiujn Stig sendis orienten.

Per similaj kontaktoj kun esperantistoj Stig ankaŭ kolektis infandeseĝnaĵojn el la tuta mondo kaj aranĝis kun ili ekspoziciojn interalie ĉe Esperanto-kongresoj.

Aŭdante pri lia morto, pola organizo, al kiu Stig ofte donis helpojn, aranĝis en Polujo memorceremonion en la sama momento kiam estis la funebra ceremonio en Tibro.

**Börje Andersson**



# Iom pri vetero kaj klimato

Svedoj ofte plendas pri la vetero, kaj ĝi vere foje povas esti terura. Plendi pri la klimato ni prefere neniam faru, ĉar konsiderante la nordan situon Svedio estas eksterordinare dorlotita tiurilate. Kio do estas la diferenco inter vetero kaj klimato? Okazas ke eĉ meteorologoj eraras kaj ekzemple uzas la vorton klimato parolante pri la pasinta ege varma somero, kvankam tio kio okazas dum unu sola somero nur montras kiom la vetero povas varii kadre de senĝanĝita klimato.

Oni povus diri ke la klimato de iu

loko estas sintezo de ĉiu vetero okazinta en tiu loko, kaj ke ĝin konstituas ne nur averaĝoj sed ankaŭ ofteco de diversaj veterfenomenoj kaj ekstremkondiĉoj. Do ekzemple estas karakteriza por la klimato de Stockholm ke la temperaturo dum januaro averaĝe estas -3 gradoj sed ankaŭ same karakteriza ke ĝi dum kelkaj horoj en jarcento estas sub -25 gradoj.

La klimato estas relative konstanta kaj tial scioj pri la estinta vetero ankaŭ donas eblecojn konkludi ion pri estontaj vetersituacioj. De multjaraj veterobservoj oni povas kalkuli la frekvencojn ekzemple de uraganoj, detruaj pluvoj kaj teruraj neĝoŝtormoj kaj uzi konojn pri tiuj frekvencoj konstruante domojn, digojn, tegmentojn k t p. Oni povus diri ke longaj serioj da veterobservoj donas eblecojn al la meteorologo fari ege longajn prognozojn. Tiuj prognozoj tamen diferencas de la kutimaj prognozoj en radio kaj televido en tio ke ili ne kapablas diri kiam la koncerna vetero okazos. Ĝi povus okazi jam venontjare, sed ankaŭ nur post 50 jaroj, sed por konstruisto sufiĉas scii ke ĝi verŝajne okazos iam dum la vivodaŭro de la konstruaĵo kaj ke tiu do devas esti proporciigita laŭ tiu risko.


Kion do pri la konstanteco de la klimato? Ĉu tio vere validas ankaŭ estonte? Oni povas dubi pri tio, sed almenaŭ por la plej proksima duonjarcento certe konkludoj bazitaj sur observoj de la vetero dum la lastaj 50 jaroj daŭre havos grandan valoron. Eble la vintroj estos 1 grado pli varmaj ol nun ĉirkaŭ la jaro 2050, sed la diferenco inter ekstreme varma kaj ekstreme malvarma vintro ene de la nuna klimato povas esti pli ol 10 gradoj. Do la eventuala aldona grado havas relative marginan signifon en multaj, sed ne ĉiuj, aplikoj.

Kiel ni vidis la averaĝa temperaturo povas varii pli ol 10 gradoj inter du vintroj. Eĉ pli impona tamen estas ke la temperaturdiferenco en unu sola vintra tago povas esti 40 gradoj inter la sudaj kaj la nordaj partoj de nia lando kaj ke la temperaturo en iuj

lokoj en norda Svedio foje altiĝas je 30 gradoj dum malpli ol 24 horoj. Tio montras ke la vetero facile kaj rapide povas varii en Svedio. Tiajn dramatajn ŝanĝojn ebligas nia situo inter enorma kontinento oriente kaj vasta oceano okcidente. Dum la vintro la neĝkovrita norda parto de la Eŭrasia kontinento estas tre malvarma, kaj foje tiu malvarmo etendiĝas okcidenten ĝis Svedio. En la Atlantiko tamen ĉiam troviĝas varma akvo kiu varmigigas la aeron, kaj necesas nur ke la ventdirekto ŝanĝiĝas de nordorienta al sudokcidenta por ke la malvarma aero rapide estu forviŝata.

Grandaj kaj rapidaj ŝanĝoj en la temperaturo ofte estas akompanataj de fortaj ventoj, pluvo aŭ neĝo kiuj povas kaŭzi konsiderindajn problemojn. Nia tre varia vetero do foje kolerigas nin, sed ĝi ankaŭ donas neŭtralan, "sendanĝeran temon por agrabla interbabilado."

**Haldo Vedin**



*La meza tago de alveno de printempo en Svedio. Observu ke la datoj estas skribitaj laŭ nestandarda maniero: (tago.monato)*  
Alveno de printempo estas kiam la averaĝa temperaturo leviĝas super 0C.  
Averaĝo por la jaroj 1951-1980.


Laŭ Bertil Eriksson: *Årstiderna i Sverige*, SMHI.

## Novaj libroj en e-librejo

Esperantio havas bonan kolekton da elektronikaj libroj. Jen la plej novaj, kiujn oni povas legi kaj elŝuti ĉe [www.esperanto.nu/elibrejo](http://www.esperanto.nu/elibrejo)

- \* Frederiko Karinthy: *Vojaĝo al Faremido*, 61 p.
- \* Frederiko Karinthy: *Norda vento*, 96 p.
- \* Vlád'a Zíka: *Justa Chess*, 208 p.
- \* Karel Čapek: *Milito kontraŭ salamandroj*, 367 p.
- \* Bertrand Russell: *Kial mi ne estas kristano*, 32 p.
- \* Uzino 4, 103 p.
- \* Henri Vallienne, *Ĉu li?* 628 p. (La unua longa romano en Esperanto)
- \* Petr Tomašovský: *Humorajoj*, 86 p.
- \* Bozena Nemcová: *Avinjo*, 390 p.
- \* Allan Kardec: *La Evangelio laŭ spiritismo* 454 p.

## Poezio de Jarlo neniam estas teda



**Jarlo Martelmonto. Cetercetere. Poemaro kun kompaktdisko. Författares bokmanskin. Stockholm, 2002. 63 p.**

"La poezio de Jarlo Martelmonto neniam estas teda," estas mia unua impresio, kiam mi legas Cetercetere, la nove aperintan poemaron de Jarlo Martelmonto, konata kiel poeziisto kaj inter la esperantistaro, kaj inter ordinaraj svedaj poezilegantoj.

Mi kredas ke estas utile citi tion, kion skribas Jarlo Martelmonto mem, inter svedoj konata kiel Jarl Hammarberg, en la antaŭparolo de la libro:

"Kiel sesdekjarulo, en la jaro 2001, mi povas konstati, ke mi jam depost mia junaĝo profunde spertis, ke la modernismo (bildarta, muzika, literatura ktp) estas mia spirita hejmo, en kiu mi sentas min vere viva.

Mi debutis kiel sveda poeto en 1964, sed jam en tiu jaro mi unue eksciis pri esperanto kaj volis ĝin lerni."

Estas la dua esperanta poemaro de Jarlo, post "AJN" (1983). La modernismo de Jarlo kondukas i.a. al tio ke en ĉiu poemaro oni trovas ion, kion oni ne atendas trovi tie. Eble trajto de modernismo estas ke io nemodernis-

ma devas aparteni al poemaro. En la svedlingva poemaro "att att gata" estis bindita papera buŝtuko kun kun la poeziaj folioj. En "Cetercetere" aperas infaneca (ĉu ankaŭ malinfaneca) kanto "Grimpomuso Klas kantas pri si mem", kiun Jarlo cetere mem kantas sur la kompaktdisko. Cetere, la libro kaj la kompaktdisko estas pli klasike modernisma.

Mi citas la komencon de la unua poeziaĵo:


*optoj indoj edoj egoj  
adzoj aŭloj haltoj aproj  
umoj obloj ujoj kromoj  
estoj igoj emoj ardoj  
altoj ankroj oftoj eskoj  
aroj ogroj infroj iroj  
ercoj indroj uroj endoj*

Traduki ĝin certe ne estas facila tasko, ĉar la signifo verŝajne ne estas la ĉefafero, sed la sono. Des pli bone estas ke ĉi foje kun la poemaro estas ankaŭ kompaktdisko, tiel ke ni povas aŭskulti la poezion de Jarlo.

Legu ĝin, aŭskultu ĝin, spertu ĝin, ĝuu ĝin.

Leif Nordenstorm

## Bela fabelaro azia



**Watanabe Aiko. Fabeloj el la Budhisma Literaturo. Tradukis: Wamaguti Sin'iti. Kolore ilustrita. Japania Budhana Ligo Esperantista. Japanio, 2002. 68p.**

La japanlingva originalo publikigis dek jarojn antaŭ la traduko. La rakontoj estis verkitaj por la ĵurnalo Dōbō, el kio sekvis ke ĉiuj havas proksimume la saman longecon - kvar paĝoj en ĉi tiu libro.

La dek tekstoj estas liberaj kaj koncizaj rerakontaĵoj de klasikaj aziaj fabeloj, sep el nordbudhismaj (mahajanaj) fontoj kaj tri el la palilingva (sudbudhisma) mezepoka libro de Buddhaghosa.

La limigita spaco de la ĵurnalo Dōbō devigis la japanan verkistinon inkluzivi nur la finan parton de la fabelo "La fratoj Pantaka", kaj ne klarigi la signifon de la nomoj Maha Pantaka kaj Ĉula Pantaka (Vojulego kaj Vojuleto, ĉar la fratoj naskiĝis survoje).

La libro estas tre bele farita, kaj tradukita en bonan kaj simplan esperanton. Iom nekutima estas la uzo de la signoj < kaj > ĉirkaŭ certaj citaĵoj - ĉu interretismo? Nu, la dek ses reguloj nenion diras pri interpunkcio.

Gunnar Gällmo

Represita el La Hirundo, n-ro 036

MER OM  
ESPERANTO-  
FÖRLAGET

Bertil Nilsson har senast i La Espero 2003:1 debatterat om Esperantoförlagets roll och uppgifter. Nu har Bertil gett ut en debattskrift på 16 sidor om förlaget. Där finns både en hel del historik och idéer.

La Esperos redaktör önskar Bertil lycka till i engagemanget för Förlaget. Förlaget behöver engagerade människor. Aldrig någonsin har så många böcker kommit ut som år 2002, fem stycken. Fortsätt på samma sätt!

# Ankoraŭfoje Svedberg, sed sen Jankéus

**Sten Johansson. Memor' mortiga. Al-fab-et-o. Skövde, 2003.**

Jen la lasta libro en la serio de sezonaj krimoj, fare de Sten Johansson. Printempe pafmurdigas tri homoj. Fariĝas la malfacila tasko de Roger Svedberg kaj liaj gekolegoj kompreni kial murdiĝis tiuj ĉi homoj, kaj kiu faris tion. Svedberg sentas malĝojon ke Tom Jankéus ne plu estas lia kolego, sed Jankéus tamen rolas en la libro.

Rolas en la libro ankaŭ nazioj, nomtabuloj, interreto kaj granda porcio da psihologio.

Sten Johansson fakte rabis de mi posttagmezon, ĉar ekleginte la libron mi ne povis lasi ĝin. Tio estas bona atesto pri tio ke la libro estas leginda, eble ne same streĉa, kiel la krimromanoj de la svedo Henning Mankell, sed preskaŭ. Sten Johansson ne atingis la nivelon de Mankell, sed li povos fari tion, se li daŭrigos sian verkadon. Sendube!

La lingvaĵo en la libroj de Sten Johansson ĉiam estas bona kaj viva. Ĉi foje mi vere klopodis trovi eraron, kaj mi fakte trovis eblan eraron. Sur p. 49 estas skribite ke "tiu persono, Eva Lundin, ankaŭ forlasis la urbon". Tio signifas ke ŝi ne nur forlasis la urbon, sed faris ankaŭ aliajn aferojn. Verŝajne la verkinto volis esprimi ke ne nur alia menciita persono, sed ankaŭ Eva Lundin forlasis la urbon. Tiaokaze estus pli bone skribi: "ankaŭ tiu persono, Eva Lundin, forlasis la urbon. Tio tamen estas la unusola ebla eraro, kiun mi trovis en la libro.

Do, aĉetu ĝin, kaj legu ĝin, aŭ distancprunteprenu ĝin en biblioteko.

Leif Nordenstorm

# Mi sidis ĉe marbordo

Mi sidis ĉe la marbordo kaj rigardis la maron.

Estis sunsubiro.

Mi vidis unu delfenon saltanta en bela mara koloro.

Mi vidis unu konkon brilanta kiel suno.

Estis preskaŭ kiel arĝento-blua.

Arbaro estis apude.

Mi prenis la konkon rigardante la arbaron.

Dek du blankaj unu-kornuloj kuris al mi

Subite ili haltis antaŭ mi.

Ili rigardis min kun siaj afablaj brunaj okuloj.

Kial vi kuris al mi tiel rapide?

mi diris malrapide.

Unu el ili skuis siajn manojn, kaj la aliaj faris same.

Tiam ili subite fariĝis kolomboj kaj flugis

horizonten en la sunsubiro.

Paulina Christiansen

## Böcker/libroj


Lärobok i esperanto för arabisktalande. 70 kronor.

La afero Jesuo kaj la Judoj, av professor Peter J Tomson. En bok som tar upp förhållandet Jesus och Judarna. 125 kronor. 158 sidor.

Nils Holgerssons underbara resa på esperanto. Översatt av Sten Johansson. En liten "tegelsten" på 614 sidor. Boken har tryckts hos "FONTO" i Brasilien. Med de sedvanliga teckning-arna. 265 kronor.

Kredo, floroj, dynamito. 38 kronor.

Beställ hos Esperanto-Centro. Tel. 08-340800. Porto tillkommer.



## La Espero rättar

I förra La Espero (2003-1) på sid 6 saknades en bild till vänster och längst nere visades en bild som var både förvrängd och felaktig. Så här skulle bilderna ha sett ut.

Till vänster: Chaplin i rollen som den judiske barberaren. Nedan: Chaplin i rollen som diktatorn Hynkel.

Båda bilderna: Svenska Filminstitutet.

La Espero beklagar bildförväxlingen.



## Kelkaj gravaj datoj en 2003

27-27 aprilo  
Svena Esperanto-kongreso en Skövde



19-26 julio  
Internacia Junulara Kongreso en Esperanto-Gården en Lesjöfors



26 julio - 2 aŭgusto  
Universala Kongreso de Esperanto en Gottenburgo kaj 35a Internacia Infana Kongreseto en Lerum

3-7 aŭ 2-9 aŭgusto  
Kultura Esperanto-Festivalo en Elsinoro (Helsingör) kaj Helsingborgo

### Årskongress i Skövde 26-27 april

Svenska Esperantoförbundets kongress kommer i år att äga rum i kulturhuset i Skövde 26-27 april. Naturligtvis kommer programmet till stor del att kretsa kring den kommande världskongressen i Göteborg. Ett bra tillfälle att bli informerad kring de aktiviteter som du kan bli en del av genom att ställa upp som medhjälpare (esp. helpanto) för några timmar, för en dag, eller längre.

Kongressavgiften är 250 kr. Kongressen börjar på lördag kl 11.00. På lördag finns lunch att inta i Kulturhusets restaurang kl 13.00. Du betalar där efter eget val. Alltså ingen förbestäld lunch. Eftermiddagskaffe kostar 15 kr och middag vid 18-tiden 120 kr.

Övernattning kan beställas på Hotell Västerhöjd. Dubbelrum per person ca 270 kr. Enkelrum 440 kr. Beställ rum genom att själv ringa tel. 0500-413832.

## Sommarkurser

### 22-28 juni på Esperantogården i Lesjöfors

Sommarkursen vid Esperantogården hålls nu för sjunde gången. Vanligtvis finns en barngrupp och en vuxengrupp. I barngruppen finns det naturligtvis ingen kateder, barnen leker, sjunger, tecknar och spelar teater på esperanto. Efter fyra-fem dagar är de redo att ha en liten föreställning. Åldern i barngruppen varierar från tre-fyra år till dess det är dags att gå till klassrummet och sätta sig med ungdomar och vuxna.

Vi har regelbundet en internationell grupp lärare av högsta klass. För vuxna och ungdomar blir det grupper allt ifrån nybörjare till konversation.

Ytterligare information, telefon: 0590-309 09.

### 23-27 juni på Oskarshamns folkhögskola.

Du som är intresserad av olika länder och kulturer, kom till Oskarshamns folkhögskola 23-27 juni 2003 för att få lära dig grunderna i esperanto.

Lärare: Kerstin Rohdin (har översatt Astrid Lindgrens böcker "Bröderna Lejonhjärta" och "Emil i Lönneberga" till esperanto och föreläst på esperanto om Astrid Lindgren i de baltiska länderna, i Polen och i Japan.

Gästande lärare: Lars Forsman, Karlskoga (föreståndare för esperantolinjen vid Karlskoga folkhögskola och författare till många läroböcker i esperanto).

Birgitta Elvall, Oskarshamns folkhögskola, är kursledare. Hon ger information om kursen och tar emot anmälningar. Tel. 0491-18958 och 0491-768100. [www.oskarshamn.fhsk.se](http://www.oskarshamn.fhsk.se) gitt.ekvall@telia.com Kostnad: 800 kr, lunch och fika ingår; 1800 kr, dubbelrum med helpension; 2100, enkelrum med helpension.

### Kallelse till SEJUs årsmöte 2003

Hjärtligt välkommen till SEJUs årsmöte 2003! Det kommer hållas i samband med SEFs årsmöte den 27-28 april på Kulturhuset i Skövde. Tiden för själva årsmötet blir på lördagen kl 11-13.

Deltagande är gratis för SEJU-medlemmar, oavsett vad som tidigare kan ha angivits. För att vi ska ha något hum om hur många vi blir ber vi att du anmäler dig senast 1 april till [seju@esperanto.se](mailto:seju@esperanto.se) eller till Lovisa på telefon 0705-828 677. Om du önskar gratis övernattning måste du meddela detta senast den 24 mars! Vill du istället boka hotellrum så kontakta Hotell Västerhöjd, 0500-41 38 32 <http://hotallvasterhojd.se> Dubbelrum kostar 400 kr/natt och extrasäng kostar 100 kr.

För frågor om hur man hittar dit, reseersättning mm gäller samma adress och nummer som för anmälan.

På programmet står förutom val av styrelse även presentation av Märta-fonden och av verksamhetsplan för 2003-04.

På söndag kostar förmiddagskaffe 15 kr. Programmet slutar kl 13.00. Därefter enkel lunch som avslutning för dem som vill och hinner 65 kr.

Betala kongressavgift och mat till SEF:s postgiro 2012-3. Ange vilka måltider du vill vara med om.

Härmed tillkännages att Svenska Esperantoförbundets årsmöte kommer att äga rum 2003-04-26 kl. 14.00 i kulturhuset i Skövde.

Härmed kallas Förlagsföreningen Esperantos andelsägare till ordinarie årsstämma i samband med SEF:s kongress i Skövde 2003-04-26,27. Exakt tid för årsstämman meddelas senare av SEF:s styrelse. Förlagsföreningen brukar få sig tilldelad 45 minuter för årsstämman men har detta år av SEF-styrelsen begärt 1,5 timmar.